

FRANCA

LA HOUSSAYE EN BRIE
F - 77610 FONTENAY TREIGNY
FRANCE

KATOLIKA ESPERANTISTO

★ Organo de FRANCA KATOLIKA ESPERANTO-ASOCIO, filio de I. K. U. E. ★
(Association Catholique Française pour l'Espéranto)

Prezidanto : S-ro R. Cl. COLAS,-6, rue de Mézières - 75006 PARIS
Sekr. : S-ro R. DESPINEY,- 43, quai de Champagne - 94170 LE PERREUX SUR MARNE
Kasistino : S-ino J. VINCENT, rue des Oiseaux,- 27700 LES ANDELYS

C.C.P.-Association Cath. Franç. por l'Espéranto - ROUEN - 23 24 93 N.-

==== le N° : 2 Fr-; Abono : 7 Fr, - kotizo : 1 Fr, = sume : 8 Fr,- =====
//::: Sendu la materialon por la bulteno al S-ino J. VINCENT, antaù la 20-a
de marto, junio, septembro kaj decembro.
+++++
-- N° 104 --- BULLETIN TRIMESTRIEL ----- TRIMONATA BULTENO -----
===== Sankta PIO-Xa, pregu por ni.

----- Aprilo 1975 -----
=====

xx

B I L E T O D E L A P R E Z I D A N T O

1975 - Année Sainte proclamée par le Pape Paul VI, année de la Réconciliation. A Rome vont affluer des foules de pèlerins venant de toutes les parties du monde.

I.K.U.E. nous invitent à répondre à cet appel. Nous aurons la joie de retrouver à l'occasion de ce Congrès des Espérantistes de nombreux pays venus chercher, dans une rencontre fraternelle, les fruits spirituels de l'année jubilaire.

Rome, haut lieu de la culture occidentale pénétrée de christianisme, nous appelle. C'est là que Pierre et Paul ont enraciné dans le monde païen conquis par les César la Nouvelle du Salut; c'est de là que se sont épanouis les rameaux qui ont porté "jusqu'aux extrémités de la Terre", la Parole et la Renaissance par le Baptême.

Dans cette affluence cosmopolite, où beaucoup de pèlerins resteront enfermés dans leur particularisme national, nos congressistes seront un exemple du partage de la prière, de la parole, du pain et des loisirs dans une unité rendue possible par l'usage de notre langue commune.

Dans la succession des Congrès de notre "I.K.U.E.", celui de 1975, le 36-e sera d'une importance exceptionnelle. Aussi devons nous insister pour que tous ceux de nos amis qui ont l'intention de se rendre à Rome à l'occasion de l'Année Sainte se réservent pour ce Congrès.

Il se tiendra du 11 au 16 août, et nous sommes accueillis par notre Samideano le Père Jacobitti dans les locaux de "Domus Pacis" et les membres du Loka Organiza Komitato.

Le programme comportera, outre la participation liturgique au Jubilé, la visite des richesses artistiques de la Ville Eternelle, et, naturellement les assises générales de notre mouvement.

Rome vous appelle - Venez nombreux !

R. Cl. COLAS.

ROME 11-16 Août 1975

ADHESION : L.K.K. Patro Jacobitti
Piazza S. Maria Maggiore 8
00185 ROMA Italie

COTISATION : 10.000 16.000 Lires

(Adhésion) C.C.P.-Jacobitti - 1/37638 Roma.

COUT PREVISIONNEL : environ 50. 000 Lires.

(valeur en Francs Français : environ 15.000 lires pour 100 Francs)

INFORMATIONS - PROGRAMME : Paraîtront dans les prochains numéros de
ESPERO KATOLIKA (E.K.)

Si vous n'êtes pas abonné à E.K., adressez directement votre inscription
à l'adresse ci-dessus.

En vue de connaître la composition de la délégation française,
vous êtes invités à signaler votre adhésion à : S-ro R. Cl. COLAS
6, rue de Mézières
75006 PARIS

LA IKUE-KONGRESO EN ROMO - 11-16/8/1975

Okaze de la Sankta Jaro, pilgramu al la Eterna Urbo.

Kongresejo estos la instituto "Domus Pacis", moderna, komforta
loko, tre taûga por nia celo. La ĉefa atingo de la kongreso estos la
akiro de la Jubilea Indulgenco, kiun oni povos gajni la 15-an de aŭgusto
dum la ĝeneralaj audiencoj en S-ta Petro, ĉirkaŭ la Papo.

Aliĝo : 16.000 liroj. Kosto de duonpensiono por la tuta restado :
50.000 liroj.

Pliaj informoj : P. Jiacinto Jacobitti
Piazza S. Maria Maggiore 8
00185 ROMA Italujo.

Atentu ! ... por kiuj vojagos vagonare : ĉiu kongresano rajtante rabaton
okaze de internacia kongreso, bonvolu peti rabatilon al P. Jiacinto
Jacobitti (lia adreso supre).

xx

P R E G O ^

=====

Sinjoro,

Mi dankas vin pro ĉio, kion vi postulis de mi.

Benata vi estas pro la epoko en kiu mi vivas;

Benata vi estas pro miaj ĝojaj kaj malĝojaj horoj;

Benanta vi estas pro ĉio, je kio vi senigis min.

Sinjoro, ne forpermesu vian malindan kaj mallaboreman serviston ...

Dio saĝa, kompatema kaj amema,

Ne forpelu min malproksime de via vizaĝo.

Gardu min je via servo dum ĉiuj tagoj de mia vivo...

Eĉ se mi estas laca servi vin,


Ne laciĝu min, ... Vi helpas min,

Vi donacas al mi gracon por ĉion rekomenca,

Por esperi, eĉ se ne estas espero,

Por gajni la venkon - la vian - malgraŭ miaj malvenkoj.

Karl Rahner.



SANKTA



JARO



ROMO ALVOKAS

UNU

SAFARO



UNU

PAŠTISTO

M I A M A S L A S I N J O R O N
=====

Mi amas la Sinjoron,
Car motis li pro mi :
Do vivon kaj laboron
Dediĉas mi al li.
Minacas min Satano
Dum vivo sur la ter',
Sed fidas mi al Dio
Kun ĝojo kaj esper'.

Matene ĝis vespere
Li ĉiam gvidas min
Mi sekvos lin sur-tere,
Kaj fine vidos lin.
Car poste en la cielo
Vivados la anim',
ĝojante en la helo
De amo ja sen lim'.

Sentime mi vagadas
Dum nuna pilgrimad',
Plenkore mi celadas
Al Dia mondregad'.
Mi amas la Sinjoron
Car mortis li por mi :
Do vivon kaj laboron
Dediĉas mi al li.

(El Himnaro esperanta)

xx

RADIO KAJ GAZETARO.

RADIO-ROMA dissendas dimanĉe de la 20.00 ĝis la 20.20 laŭ la ondolongoj:
50.08 m (5990 KHz); 41.24 m (7275 khz); 30.90 m (9710 khz)

Adreso : P. Radiô-Roma, Esperanto-fako, Casella Postale 320, I-00100 ROMA
Italujo

QUID 1975 aperigis la jenan artikolon (P. 662)

L' ESPERANTO

1-er livre d'étude publié en 1887 par l'oculiste polonais Zamenhof (1859-1917). Grammaire simple(16 règles). Orthographe phonétique. Vocabulaire international (16000 racines à partir desquelles on peut former plus de 160.000 mots grâce à un système de dérivation par affixes). Il y aurait environ 1.500.000 espérantophones répartis dans 89 pays. Littérature (traduite ou originale): plus de 33.000 volumes (dont 163 dictionnaires et terminologies techniques et scientifiques). Presse : plus de 100 titres. Radio : 17 stations émettent en Espéranto. Associations spécialisées : cheminots, médecins, enseignants, journalistes, etc. Universités : 20 (dont Aix et Clermont-Ferrand en France) enseignent la langue.

EPINAY-ETAMPES, Ste-GENEVIEVE
invitas vin la 29-an de junio.

9.00/12.00 : "Rallye" en ESONNE : turisma promenado por demandoj kaj ludoj
12.30 : Kamparana tagmanĝo
15.00 : La Asocio "Renaissance et Culture" kaj "Essone-Esperanto"
prezentos grandan ekspozicion kaj filmojn pri pentraĵo,
arkitekturo, skularto, muziko.
16.00 : Esperanta filmo pri arkitekturo.
16.30 : Rezultoj de la ralio kaj premioj

Prezo : 26 Fr- (ralio, tagmanĝo, vino, kafo entenataj)

Adreso : S-ro HENRY Hugues, 9, rés. Rochebrune, 91220 BRETIGNY.

NEKROLOGO

Perpignan. La patroj Kapucenoj informis pri la forpaso de Patro Antoine Raynal, la 23-an de januaro 1975. Li estis multjara ano de nia asocio kaj bona informanto pri nia afero. Li pace ripozu kun la helpo de niaj pregoj !

+++++ +++++++ +++++++ +++++++ +++++++ +++++++ +++++++ +++++++ +++++++ +++++++

Respondojn al la proponoj de la N° 103 sendis S-roj Bourgois (B); Despiney (D); Guillot (G); kaj s-ino Michau (M).

- 1) sin luli en ĝojo (B); envolviĝi en ĝojo (D); travivi daŭran ĝojon (G); ĝsendetene ĝojigi (M). 2) fiše oscedi (B); kiel karpo oscedadi (D); enue oscedi (G); senbremse ascendadi (M). 3) funde scipovi, lerte praktiki; implikiĝi (B); bone koni sian aferon (D); esti familiariĝinta kun la afero (G); senpene pritrakti, prilabori, prizorgi (M). 4) vojban-dito (B), (G); estrata ŝtelegisto (D); sperta bandita (M). 5) ĉparadi (B) iom post iom ĉspari (D); amasigi monon (G); iompostiome riĉigi (M). 6) li atingis la plejsupran de sia kariero (B); li avancis ĝis sia plej alta grado (D); li havas sian plej altan promocion (G); li pruvis kompetentecon, li estas kvalifikita (M). 7) vetrapidi kun la horloĝo (B) agi por trafi celon je la antaŭvidita momento (D); lukti por gajni tempon (G); lukti por ĉustatempe atingi (M); babilema kiel birdo (B); babilema kiel pigo, papago (D); babilegema (G); babiladema (M). 9) ĉvitegi subcikano (B); esti mirigita kaj admiranta (D); penegi (G). 10) zorge tualeti (B); aranĝi sian eksterajon (D); aranĝi siajn harojn (G); flege sin beligi (M).

La honorpalmon al S-ino Michau !

Novaj proponoj : *) prendre le taureau par les cornes; 2) être d'une force herculienne en mathematiques; 3) être dans la lune; 4) réciter comme un perroquet; 5) l'affaire est tombée à l'eau (G); 5) nous voilà bien lotis ! ; 7) il est bien mal en point; 8) une blonde incendiaire; 9) boire en suisse; 10) boire la tasse (B).

D I S T R A A N G U L O .

Solvo de la krucvortenigmo : Horizontale : 1) hepata, kaf; 2) uragano, ro; 3) mirigita, j; 4) oni, omaron; 5) razilon, r; 6) aco, i, kaĉ; 7) o, abomeni; 8) a, ĉarma, ĝu; 9) kvarobla, j; 10) ver, rado.
Vertikale : 1) humora, akv; 2) erinaco, ve; 3) parizo, ĉar; 4) agi, i, aar; 5) tagolibro; 6) animo, ombr; 7) otan, mala; 8) K, ar, ke ad; 9) ar, aranĝ, o; 10) fojn, ĉiu.

mm

NIA MEMBRARO.

Subtenantoj 1975 : 2) F-ino ESPRIT; 3° S-ro LE MARQUAND.

Novaj membroj : 3) S-ro Polmard (Meuse); 4) S-ro Canus (Meuse); 5) S-ino Henry (Essonne); 6) S-ino Rivalin (Vendée).

xxx

PROTOKOLO DE LA KONSILIA KUNVENO DE LA 2-a DE MARTO 1975.

=====

La kunveno okazis 4 bis, rue de la Cerisaie, en Parizo.

Ĉeestis : S-ino VINCENT, F-ino VANNEAU, S-to DEGRELLA, F-to MARMOU, S-roj COLAS kaj DESPINEY.

Senkulpiĝis : S-to BOURDON, S-ino MICHAU, S-roj BESSIÈRE, LIGOT k.VERON.

Post preĝo kaj akcepto de la protokolo de la lasta konsilia kunveno, la ĉeestantoj ekpritraktis la laborojn de la tagordo.

Nacia kongreso en Lille - Por akceli la aliĝadon, estis decidite ne atendi la aperon de la venonta bulteno, sed sendi senprokraste aliĝilon al niaj membroj.

Studante la provizoran programon, la konsilio decidiĝis proponi al Pastro BOURDON la jenajn modifojn :

.../...

.../...

a): Antaùvidi du horojn por la daùro de la ĝeneralaj kunvenoj - B): trovi tempon por pritrakti la temon : "Repaciĝo, temo, kiu rilatas al la Sankta Jaro.

Aliflanke ni sugestos al Pastro BOURDON, ke li invitu al nia kongreseto la religiajn instancojn de LILLE : Episkopo, Superulo de la Dominikana monaĥejo, Rektoro de la Katolika Universitato, ktp. Ankaù, ke li ne hezitu aperigi artikolojn en la loka gazetaro.

Siaflanke, nia ĝeneralaj sekretarioj informos la jurnalon "LA CROIX" E Kumena Diservo en TOURS - La membroj de nia asocio, kiuj partoprenos la kongreson de U.F.E., estas invitataj partopreni tiun ceremonion, kiu okazos Paskan Dimanĉon je 18.15 h. en la Kapelo de la Sankta Vizaĝo.

Sinteno de la Katolika gazetaro fronte al Esperanto. La ĝeneralaj sekretarioj rememoras siajn klopodojn por interesi al Esperanto la Movadon "PAX CHRISTI". Ni atendas la aperon de artikolo en "LE JOURNAL DE LA PAIX".

Poste li rimarkigas al ni, ke du foje en la jurnalero "LA CROIX" Esperanto estis misprezentita. Post lia reago artikolo de li aperis en "LA CROIX" de 29 JAN 75.

Nia membraro - Nun ĝi superas 150 anojn.

Diversajoj - La konsilio decidis sendi salut-telegramon al la 53-a Germana Esperanto-Kongreso, kiu pentekoste okazos.

Unuanime la konsiliarioj voĉdonis partoprenon en stipendio, kiu ebligas la ĉeeston de la junaj Patrick DEVEUGHELE al la Skolta Jamboreo de 1976.

F-to MARMOU legis leteron de nia konsiliario S-ro VERON pri la rilatoj inter I.K.U.E. kaj F.K.E.A.. Ni estus dankemaj al S-ro VERON, se li aperigus de tempo al tempo artikolon pri I.K.U.E. kaj "ESPERO KATOLIKA".

Post kelkaj rimarkoj pri la kongreso de I.K.U.E. en ROMO, oni preĝis por ĉesigi nian kunvenon.

Protokolis : R. DESpiney.

!!!!!!!!!!!!!!

NIA KONGRESO EN LILLE 17/19-an de majo 1975.

JARKUNVENO DE F.K.E.A.-

Instrukcioj por la balotado : estas 4 kandidatoj por 4 postenoj. Bonvolu enmeti la ĉi suban voĉdonilon en koverteton kun indiko "Voĉdonado FKEA". Tiun fermitan koverteton enŝovu en alian, afrankitan je 0,80 Fr, kiu vi sendos al S-ro R. DESpiney, 43, quai de Champagne, 94170 LE PERREUX SUR MARNE, dorsflanke vian nomon kaj adreson.

Se vi ne partoprenos la kongreson, bonvolu krome resendi la ĉi suban rajtigilon, en la sama sendajo.

===== ^
VOĈDONILO

- 1) S-ro COLAS René-Claude (Paris) 3) S-to BOURDON Louis (Lille)
2) S-ro DESpiney Roger (Le Perreux) 4) S-ro BESSIERE Albert (Rennes)
- =====

RAJTIGILO

Mi subskribinta (nomo, voknomo) nepovante partopreni la kongreson, transdonas mian povon al por ĉiuj decidoj favoraj al la asocio.

Antaù ol subskribi, skribu
"Bon pour pouvoir"

Dato kaj subskribo :

KOTIZTABELO 1975

IKUE kun "Espero Katolika"	27 Fr
IKI kun "Vojo, Vero, Vivo"	5 Fr
Peranto : G. Véron, C.C.P. - ROUEN - 11 88 63 Z.-	
ACFE kun "Franca Katolika Esperantisto"	8 Fr
infanoj malpli ol 16-jara, sacerdotoj, religiul(in)oj ..	4 Fr
Membro bonfaranto	40 Fr
Dumviva membro	160 Fr
U.F.E. kun "Revue Française"	60 Fr
U.E.A. kun "Esperanto" kaj "Jarlibro"	88 Fr
C.C.P.- Association Cathol. Franç. pour l'Esperanto - ROUEN- 23 24 93 N.-	

Abono al "Biblia Revuo" 28 Fr

Peranto : G. Baudry - C.C.P.- LILLE - 47 04 43 -

xx

Dépôt légal : 2-e trimestre 1975 // Poly copié par : F.M.C.

Papier de Presse N° 34.745- // Prieuré Saint-Martin

Directeur-Gérant : Gaston VERON // LA HOUSSAYE EN BRIE
// F- 77610 FONTENAY TREIGNY
FRANCE

xx